

EL LA REMEMOROJ DE IJON TICHY

Stanislaw Lem

Ĉu vi volas, ke mi denove rakontu ion? Jes... Mi vidas, ke Tarantoga prenis jam sian stenoblokon... profesoro, atendu. Ja mi vere havas nenion por rakonti. Kio? Ne, mi ne ŝercas. Kaj cetere, mi povas finfine, unuafoje, havi dezireton prisilenti ĉi tiun vesperon en via rondo. Kial? Ba, kial! Miaj karaj, mi neniam diris tion, sed la Kosmo estas antaŭ ĉio loĝata de estuloj samaj kiel ni. Ne nur homformaj, sed similaj al ni kiel du akvogutoj. Duono de loĝataj planedoj estas Teroj, iom pli grandaj, iom pli etaj, klimato pli malvarmaj aŭ pli tropikaj, sed ĉu tio grave diferencas? Kaj ilia loĝantaro... homoj —ĉar fakte ili estas homoj— tiel similas al ni, ke la diferencoj substrekas nur la similecon. Ke mi ne rakontis pri ili? Ĉu mirige? Pripensu. Mi rigardas stelojn. Mi memoras diversajn okazojn, diversaj bildoj ekstaras antaŭ mi, sed mi revenas plej volonte al tiuj eksterordinaraj. Eble ili estas teruraj, strangeĝaj, timigaj aŭ eĉ ridindaj, kaj pro ĉio ĉi nedamaĝaj. Sed rigardi stelojn, miaj karaj, kaj scii, ke tiuj etaj, bluaj fajreroj estas —se vidataj de proksime— ŝtatoj de malbeleco, tristo, senkonscio, ĉiu ajn ruino, ke tie, en la malhelblua ĉielo, ankaŭ svarmas malnovaj kabanaĉoj,

malpuraj kortoj, strat-kanaletoj, rubejoj, tombejoj. Ĉu rakontoj de iu, kiu vizitis la Galaksion, devas elvoki plendadon de kolportisto migranta de unu al alia provinca urbeto? Kiu volus aŭskulti? Kaj kiu lin kredus? Tiaj pensoj venas, kiam la homo estas iom deprimita aŭ sentas stultan inklinon al sinceraj konfidencoj. Tial, por ne malgajigi kaj humiligi, hodiaŭ mi rakontos nenion pri la steloj. Ne, mi ne silentos. Vi sentus vin trompitaj. Mi rakontos ion, konsentite, sed ne pri vojaĝo. Fakte, ankaŭ sur la tero mi travivis iom. Profesoro, se vi nepre volas, komencu noti.

—Kiel vi scias, miaj gastoj ofte estas tre strangaj. Mi elektos inter ili unu kategorion: la ignorataj inventistoj kaj sciencistoj. Rigardu kiel ridetas Tarantoga, sed la afero ne rilatas lin, li estas ja estimata inventisto. Hodiaŭ mi parolos pri tiuj, kiuj ne sukcesis, aŭ pli ĝuste, kiuj sukcesis tro bone: ili atingis celon kaj ekvidis ĝian vanecon. Kompreneble ili ne konfesis tion. Nekonataj, izolitaj, ili persistis en tia frenezo, kiun nur la famo kaj la sukceso transformas kelkfoje, rarege, en faktoron de progreso. Kompreneble, la granda plimulto el tiuj alvenintaj al mi estis la griza frataro de obsedo, la homoj malliberigitaj de unu ideo, foje eĉ ne sia, sed elprenita de antaŭaj generacioj, kiaj la inventintoj de la “perpetuum mobile”, povraj je konceptoj, trivialaj en solvoj, evidente absurdaj. Tamen, eĉ en ili bruletis tiu ardo de sindonemo kiu konsumas la vivon kaj devigas la daŭrigon de penoj anticipe vanaj. Kompatindaj estas tiuj abortintaj genuloj, titanoj de nana spirito, denaske kripligitaj de la naturo, kiu, en unu el siaj mornaj ŝercoj, samtempe dotis ilin per manko de talento kaj kreemo inda je Leonardo; kun ili estas ligitaj dum la vivo indiferenteco aŭ rikano, kaj ĉio, kion oni povas fari por ili, estas pacience aŭskul-

ti ilin unu aŭ du horojn, ŝajnigante partopreni ilian monomanion.

En tiu homamaso, kiun nur propra stulteco gardas kontraŭ malespero, aperas rare aliaj homoj, mi ne volas ilin nomi nek prijuĝi, vi mem faros tion. La unua figuro, kiu venas en mian kapon, estas tiu de profesoro Corcoran.

Mi ekkonis lin antaŭ naŭ jaroj, eble dek. Tio okazis dum scienca konferenco. Ni parolis apenaŭ kelkajn momentojn, kiam subite li faris demandon neniel aludantan la ĝistiaman temon:

—Kion vi opinias pri spiritoj?

Komence mi pensis, ke tio estis ekstravaganca ŝerco, sed mi memoris, ke mi aŭdis klaĉojn pri lia eksterordinareco, mi ne memoris nur en kiu senco oni diris tion, ĉu pozitiva aŭ negativa. Tial ĉiaokaze mi respondis:

—Pri tiu temo mi posedas nenian opinionon.

Li ne plu insistis sed revenis al la antaŭa temo. Estis jam aŭdeblaj la sonoriloj anoncantaj la komencon de pliaj debatoj, kiam li kliniĝis subite —li estis multe pli alta ol mi— kaj diris:

—Tichy, vi estas mia homo. Vi ne havas antaŭjuĝojn. Povas esti cetere, ke mi eraras, sed mi estas preta riski. Venu al mi —tiam li donis al mi vizitkarton. Bonvolu telefoni antaŭe, ĉar mi ne respondas la pordsonorilon kaj malfermas por neniu. Cetere, faru laŭ via volo...

Tiun saman vesperon, manĝante kun Savinelli, la konata juristo specialiĝinta en kosma juro, mi demandis lin, ĉu li konas iun profesoron Corcoran.

—Corcoran!— li ekkriis kun sia kutima temperamento, pliardigita de dua botelo da sicilia vino— tiu freneza cibernetikisto? Kio okazas al li? Mi ne aŭdis pri li de jarcentoj!

Mi respondis, ke mi scias pri li nenion konkretan, nur la nomo venis al miaj oreloj. Mi pensas ke Corcoran estus aprobinta mian sintenon. Savinelli rakontis al mi ĉe vino iom da cirkulantaj klaĉoj. Rezultis el ili, ke en sia juneco Corcoran havis tre promesplenan sciencistan estontecon, kvankam eĉ jam tiam manifestiĝis lia tuta manko de respekto al pliaĝuloj, transformiĝanta ofte en arogantecon; kaj poste li fariĝis verdirulo, el tiuj, kiuj ŝajnas ĉerpi tiom da kontentigo dirante al la aliaj, kion ili pensas pri ili, kiom el la fakto, ke tiel ili plej malutilas al si mem. Kiam li jam mortofendis siajn profesorojn, kolegojn kaj oni fermis por li ĉiujn pordojn, li —riĉigita de granda, neatendita heredaĵo— aĉetis iun kabanaĉon ekster la urbo kaj transformis ĝin en laboratorion. Li vivis en ĝi kun robotoj; nur tiajn asistantojn kaj helpantojn li toleris ĉirkaŭ si. Eble li faris ion tie, sed la kolumnoj de sciencaj revuoj estis por li neatingeblaj. Cetere li ne zorgis pri tio. Tiutempe li ankoraŭ starigis rilatojn kun la homoj nur por ilin, post atingo de iu amikeco, en eksterordinare vulgara maniero, sen iu ajn videbla kaŭzo —forpuŝi, ofendi. Kiam li jam maljuniĝis tute kaj tiu abomena amuzo enuigis lin, li fariĝis solulo. Mi demandis Savinelli, ĉu li scias ion pri tio, ke Corcoran kredas je spiritoj. La juristo, kiu estis ĝuste trinkanta vinon, preskaŭ misglutis pro rido.

—Li? Je spiritoj?! —li ekkriis. Nu, li ja eĉ ne kredas je homoj!

Mi demandis kiel kompreni tion. Li respondis, ke tute laŭvorte; Corcoran estis, laŭ li, solipsisto kredanta nur je sia ekzisto, konsiderante ĉiujn aliajn fantomoj, songaj aperaĵoj, kaj laŭdire tial li traktis tiel eĉ la plej proksimajn: se la vivo estas speco de songo, oni povas ĉion en ĝi. Mi rimarkis, ke konsekvence li povus kredi ankaŭ je

spiritoj. Savinelli demandis, ĉu mi aŭdis iam pri ciberne-
tikisto, kiu kredus je ili. Ni parolis poste pri io alia —sed
jam tio, kion mi aŭdis, sufiĉis por vekti mian scivolon. Mi
estas homo de rapida decido, do mi telefonis la sekvan
tagon. Respondis roboto. Dirinte mian nomon, mi kla-
rigis la kialon de la alvoko. Corcoran telefonis al mi la
postan tagon, malfrue en la vespero kiam mi ĝuste estis
irona dormi. Li diris, ke mi povas viziti lin eĉ tuj. Prok-
simiĝis la deknua. Respondinte, ke mi iros tuj, mi ves-
tiĝis kaj forveturis. La laboratorio estis granda, morna
konstruaĵo, troviĝanta ne tro fore de ŝoseo. Mi vidis ĝin
plurfoje kaj ĉiam ŝajnis al mi, ke ĝi estas malnova fa-
briko. Nun ĝi estis tute malluma. Eĉ plej eta brilo ne
heligis iun el la kvadrataj fenestroj enmure tre profundi-
gataj. Ankaŭ la granda placo inter fera ĉirkaŭbaro kaj
pordego estis nelumigita. Plurfoje mi stumblis sur iuj
knarantaj ladoj kaj disaj reloj, do iom ĉegrenita mi alve-
nis ĉe preskaŭ nevideblan pordon kaj eksonorigis laŭ
speciala maniero, ordonita al mi de Corcoran. Post kvin
minutoj li mem malfermis, en griza laboratoria mantelo,
diversloke trabruligita de acidoj. Li estis terure magra,
osta, kaj portis grandegajn okulvitrojn kaj grizajn lip-
harojn, unuflanke pli kurtajn, kvazaŭ ekmorditajn.

—Post mi, sinjoro— diris li sen enkondukoj. Laŭ
longa, ete lumigita koridoro, en kiu kuŝis diversaj maŝi-
noj, bareloj, blankaj sakoj da cemento, li kondukis min
al granda ŝtala pordo. Super ĝi brulis okulfrape lampo.
Li elpoŝigis el la mantelaĉo ŝlosilon, malfermis kaj eniris
unua. Mi sekvin lin. Pere de helica fera ŝtuparo ni as-
cendis sur la supran etaĝon. Tie vidigis granda fabrika
halo kun vitrigita volbo —kelkaj nevalitaj lampoj ne
sufiĉis por lumigi ĝin, ili montris nur ĝian krepuskan
grandegon. Ĝi estis malplena, morta, forlasita. Alte sub

la volbo blovegis la vento kaj la pluvo, kiu ekfalis ĉe mia alveno al la sidejo de Corcoran, batis la fenestrojn, malhelajn kaj malpurajn, tie kaj alie la akvo fluis tra kelkaj fenestraj truoj. Corcoran, kvazaŭ ne vidante tion, iris antaŭ mi paŝante forte kaj brue sur la ferslaboj de la galerio. Alia ŝtala, fermita pordo kaj post ĝi, koridoro, malordo da iloj forlasitaj, kvazaŭ dum forkuro, kuŝantaj ĉe la muro, kaj kovritaj de dika polvotavolo; la koridoro kurbiĝis, ni iris supren, poste malsupren, preterpasis transmisiajn rimenojn kumplektitajn kvazaŭ sekigitaj serpentoj. Tiu vagado, ĉe kiu mi ekkonis la vastecon de la konstruaĵo, daŭris; unu aŭ du fojojn Corcoran, en plej ombraj lokoj, avertis min pri ŝtupo, aŭ pri malalta plafono. Ĉe la lasta el la vico de tiuj ŝtalaj, certe kontraŭfajraj pordoj, kompakte nititaj, li haltis kaj poste malfermis ĝin; mi rimarkis, ke kontraŭe al aliaj ĝi tute ne grincis, kvazaŭ ĝiaj ĉarniroj estas ĵus oleitaj. Ni eniris altan ĉambron preskaŭ tute malplenan, Corcoran haltis en la mezo, kie la betono de la planko estis iom pli hela, kvazaŭ iam staris ĉi-loke maŝino, el kiu postrestis nur elstaraj stumpoj de kuŝejoj. Laŭ la muroj kuris vertikalaj dikaj stangoj, aspekte similaj al kaĝo. Mi rememoris la demandon pri spiritoj... Al la stangoj estis alkroĉitaj bretoj, tre masivaj, kun apogiloj, kaj sur ili staris dekelkaj kestegoj. Ĉu vi konas la aspekton de tiuj kofroj kun trezoroj, kiujn en sagaoj enterigas piratoj? Tiel same aspektis ĝuste la kestegoj, kun konveksaj kovraĵoj sur kiuj pendis, kovrita en celofano, blanka folio dokumenta simila al tiuj kulture pendigitaj ĉe la hospitalaj litoj. Alte, sub la volbo, brulis lampo tiel polvokovrita, ke estis tro malhele, por ke mi povu deĉifri eĉ unu vorton skribitan sur tiuj folioj. La kestegoj, el kiuj unu troviĝis pli alte, staris en du vicoj, unu super la alia; aparte, mi memoras ke mi kal-

kulis ilin, estis ŝajne dek du, eble dek kvar, mi jam ne scias precize.

—Tichy —turnis sin al mi la profesoro, kun enpoŝigitaj manoj— enaŭskultu momenton tion, kio ĉi tie estas. Poste mi eksplikos —nu, aŭskultu!

Li estis specife malpacienca, tio okulfrape vidiĝis. Komencante diri ion, li tuj volis ailri la esencon, havi jam ĉion post si, jam fini: kvazaŭ ĉiun momenton pasigitan kun iu alia li rigardis perdita.

Mi fermetis la okulojn kaj staris momente senmova, pli pro simpla ĝentileco ol pro deziro aŭskulti resonojn, kiujn mi enirante eĉ ne rimarkis. Verdire mi aŭdis nenion, krom iu eta zumado de kurento en bobenoj aŭ io simila, sed mi certigas vin, ke ĝi estis tiel mallaŭtega, ke la voĉo de agonianta muŝo estus pli aŭdebla.

—Nu, kion vi aŭdas? —demandis li.

—Preskaŭ nenion —mi konfesis— ian zumadon... eble ĝi estas nur orelzumado.

—Ne, ĝi ne estas orelzumado... Tichy, aŭskultu atente, ĉar mi ne ŝatas ripeti, kaj mi diras ĉi tion, ĉar vi min ne konas. Mi ne estas vulgarulo, nek krudulo, kiel oni rigardas min; nur nervozigas min la idiotoj, al kiuj oni devas dekfoje ripeti la samon. Mi esperas, ke vi ne apartenas al ili.

—Ni vidos —mi respondis— diru, profesoro...

Li kapsignis kaj montrante la vicojn de tiuj feraj kestegoj eldiris:

—Ĉu vi estas kompetenta pri elektronaj cerboj?

Nur tiom, kiom oni bezonas en la navigado —mi respondis. Mia teoria scio estas eta.

—Tiel mi pensis. Ne gravas. Tichy, aŭskultu. En tiuj ĉi kestegoj troviĝas plej perfektaj elektronaj cerboj, iam ajn ekzistantaj. Ĉu vi scias, en kio konsistas ties

perfekteco?

—Ne —mi respondis konforme al la vero.

—En tio, ke ili servas al nenio, ke ili estas absolute sentaŭgaj, senutilaj, ke ili estas —unuvoite— realigitaj de mi, vestinte per materio la monadojn de Leibniz...

Mi atendis, kaj li parolis plu, dum liaj grizaj lipharoj aspektis, en la duonlumo, kvazaŭ apertaj flugiloj de blanketa nokta papilio.

—Ĉiu el la kestegoj enhavas elektronan sistemon, kiu kreas konscion. Kiel nia cerbo. La materialoj estas aliaj, sed la regulo, tute sama. Ĉi tie ĉesas la simileco. Ĉar niaj cerboj —atentu sinjoro!— estas ligitaj al, kiel oni diras, ekstera mondo pere de sensaj akceptiloj: okuloj, oreloj, nazo, haŭto kaj tiel plu. Kaj ĉi tiuj —li fingre montris la kestegojn— havas sian “eksteran mondon” tie, en la interno...

—Kiel tio eblas? —demandis mi. Ion mi komencis supozi; la supozo ne estis preciza, sed mi igis min tremeti.

—Tre simple. Kial ni scias, ke ni havas la korpon tian, kaj ne alian, ĝuste tian vizaĝon; kaj ke ni staras, ke ni tenas libron en la mano, ke floroj odoras? Nu, ĉar certaj impulsoj stimulas niajn sensojn kaj per nervoj fluas en la cerbon stimuloj. Imagu, Tichy, ke mi scipovas stimuli vian flaran nervon en la sama maniero, kiel faras dianto —kion vi sentos?

—La odoron de dianto, kompreneble —mi respondis— kaj la profesoro, kapsignante kvazaŭ kontenta pro mia komprenkapablo diris plu:

—Kaj se mi farus la samon kun ĉiuj viaj nervoj, vi sentus ne la eksteran mondon, sed tion, kion mi per viaj nervoj telegrafus al via cerbo... ĉu klare?

—Klare.

—Bone. Tiuj ĉi kestegoj havas akceptorganojn funkciantajn analoge al niaj vido, flaro, aŭdo, tuŝo kaj tiel plu. Kaj la dratoj de tiuj akceptiloj —kiel nervoj— anstataŭ al la ekstera mondo, kiel la niaj, estas konektitaj al tiu cilindro, tie, en la angulo. Vi ne rimarkis ĝin, ĉu?

—Ne —mi diris. Efektive, la cilindro, kun eble trimetra diametro, staris en la fundo, kvazaŭ starigita muelŝtono, kaj post momento mi rimarkis ke ĝi turniĝas ege malrapide.

Jen la destino de niaj cerboj —diris trankvile la profesoro Corcoran. Ilia sorto, ilia mondo, ilia esto —ĉio, kion ili povas akiri kaj sperti. Troviĝas tie specialaj bendoj kun registritaj elektraj stimuloj, tiaj, ke ili ekvivalentas al cent aŭ ducent miliardoj da fenomenoj, kiujn homo povas renkonti dum la plej impresplena vivo. Se vi levus la kovrilon de la cilindro, vi rimarkus nur brilantajn bendojn kovritajn per zigzagoj blankaj kiel ŝimo sur celuloideo; sed ili estas, Tichy, varmegaj noktoj de la sudo kaj susuro de ondoj, formoj de bestkorpoj kaj pafadoj, sepultadoj kaj diboĉadoj, gusto de pomoj kaj piroj, neĝventegoj, vesperoj pasigitaj en akompano de la familio ĉe brulanta kameno, kriegoj sur ferdeko de dronanta ŝipo, konvulsioj de malsano kaj montaj pintoj, tombejoj kaj halucinoj de delirantoj. Ijon Tichy: tie estas la tuta mondo!

Mi silentis, kaj Corcoran, kaptante fermene mian brakon, diris:

—Tiu kestegoj, Tichy, estas konektitaj al la artefarita mondo. Tiu —li montris la unuan el la vico— kredas, ke ŝi estas deksepjara knabino, verdokula, rufhara, kun korpo aminda. Ŝi estas filino de registarano... kaj amas junulon, kiun ŝi vidas preskaŭ ĉiutage tra la fenestro... Li estos ŝia malbeno. Tiu alia estas certa sciencisto. Li

estas jam proksime de la ĝenerala teorio de gravito, kiu funkcias en lia mondo, en tiu mondo, kies limoj estas la feraj vandoj de la cilindro; kaj li pretiĝas batali por sia vero, en izoleco pliigata de blindeco minacanta lin, ĉar li iĝos blinda, Tichy... kaj tie, pli supre, estas la membro de pastra kolegio, kaj li travivas la plej pezajn tagojn de sia vivo, ĉar li perdis la kredon je la ekzistado de sia animo senmorta; apude, post la intervando, staras... sed mi ne povas rakonti al vi la vivojn de ĉiuj estuloj, kiujn mi kreis...

—Ĉu mi povas interrompi? —mi demandis. Mi volus scii...

—Ne! Vi ne povas! —ekkriegis Corcoran. Neniu povas! Nun parolas mi, Tichy! Vi ankoraŭ komprenas nenion. Vi certe pensas, ke tie, en la cilindro, estas fiksitaj diversaj signaloj, kiel sur gramofondisko, ke la eventoj estas ordigitaj kiel melodio, kun ĉiuj tonoj, kaj ili nur atendas, kiel muziko sur disko, ke la pinglo vivigu ilin, ke tiuj ĉi kestegoj reproduktos laŭvice grupojn da travivaĵoj, ĝis la fino, kaj ke ili estis jam fiksitaj de antaŭe. Malvero! Malvero! —li kriis terure, ĝis bruegis eĥo de la metala volbo. La enhavo de tiu cilindro estas por ili tio, kio por vi la mondo, en kiu vi vivas! Ja, vi ne pensas, kiam vi manĝas, dormas, vekigaĝas, vojaĝas, vizitas maljunajn frenezulojn, ke ĉio ĉi estas gramofona disko, ĉe kiu la ektuŝo de nadlo vekas tion kion vi nomas estanteco!

—Sed... —komencis mi.

—Silentu! —li kolere kriis. Ne ĝenu! Nun parolas mi!

Mi pripensis, ke tiuj nomantaj lin krudulo multe pravis, sed mi devis atenti, ĉar tio, kion li diris, vere estis senprecedenca. Li kriis plu:

—La sorto de miaj feraj kestegoj ne estas de komence ĝis fine antaŭfiksita, ĉar la eventoj troviĝas tie, en la ci-

lindro, sur la vicoj de paralelaj bendoj; kaj nur funkcianta laŭ blinda hazardo la selektilo decidas pri tio, el kiu serio da bendoj la kolektilo de sensaj impresoj de la kestegoj ĉerpos postmomente la enhavojn! Memkompreneble, ĝi ne estas tiel simpla, kiel mi diris, ĉar la kestegoj mem povas influi ĝis certa grado la movojn de la kolektilo, kaj hazarda selektado okazas plene, nur kiam miaj kreituloj kondutas pasive... sed ili havas liberan volon, limigitan nur de tio sama, kio limigas la nian: ilia specifa strukturo de personeco, pasioj, denaskaj kriplesoj, eksteraj cirkonstancoj, diversaj gradoj de inteligenteco —mi ne povas ekspliki ĉiujn detalojn...

—Eĉ se tiel estas —mi aldonis rapide— kiamaniere ili ne scias, ke ili estas feraj kestegoj, kaj ne rufa knabino aŭ sacerdo...

Nur tion mi sukcesis eldiri, antaŭ ol li interrompis—

—Ne ludu azenon, Tichy. Vi konsistas el atomoj, ĉu ne? Ĉu vi sentas viajn atomojn?

—Ne.

—Viaj atomoj formas molekulojn de albumeno. Ĉu vi sentas vian albumenon?

—Ne.

—Dum ĉiu sekundo de la nokto kaj la tago trapikas vin la kosmaj radioj. Ĉu vi sentas tion?

—Ne.

—Do kiel miaj kestegoj povas ekscii, ke ili estas kestegoj, azeno?! Same, kiel por vi la mondo estas aŭtentika kaj unika, por ili aŭtentikaj kaj sole realaj estas la enhavoj, kiuj el mia cilindro fluas en iliajn elektronajn cerbojn... En tiu cilindro troviĝas ilia mondo, Tichy, kaj iliaj korpoj — neekzistantaj en nia realeco alie ol kiel relative firmaj grupoj da truetoj en la perforitaj bendoj — troviĝas enpakitaj interne de kestegoj, ...Tiu randa, ĉi

flanke, supozas sin virino eksterordinare bela. Mi povas diri al vi precize, kion ŝi vidas, kiam nude ŝi rigardas sin en spegulo. Kiajn juvelojn ŝi amas, kaj kiajn ruzaĵojn ŝi uzas, por konkeri virojn. Mi scias ĉion, ĉar ĝuste mi, kun la helpo de mia sortoskribilo, kreis ŝin, ŝian — por ni imagan, sed por ŝi realan — formon, tiel reala, kun vizaĝo, dentoj,odoro de ŝvito, cikatro postlasita sur la skapolo, haroj kaj orkideoj, kiujn ŝi enplektas en ilin; ĉio, same reala, kiel por vi estas realaj viaj manoj, kruroj, ventro, kolo kaj kapo! Mi esperas, ke vi ne dubas ilia ekzistado tado...?

—Ne —mi respondis trankvile. Neniam iu tial kriis al mi, kaj eble tio estus amuzinta min, sed mi estis jam tro konsternita pro la vortoj de la profesoro — al kiu mi ekkredis, ne vidante kaŭzojn por malfido —, por zorgi pri lia konduto.

—Tichy —diris iom pli silente la profesoro— mi diris ke inter alie mi havas ĉi tie scienciston; jen, ĉi kestego antaŭ vi. Li esploras sian mondon, sed neniam —komprenu— neniam li havos eĉ la plej etan supozon, ke lia mondo ne estas reala, ke li perdas tempon kaj fortojn en esplorado de tio, kio estas nur serio da cilindroj kun volvita filmbendo, kaj ke liaj manoj, kruroj, okuloj kaj liaj propraj blindigantaj okuloj, estas nur iluzio, kreita en lia elektra cerbo per elektraj malŝarĝoj de la konvene elektitaj impulsoj. Por kompreni tion, li devus eliri sian feran kestegon eksteren —do ekster si mem— kaj ĉesi la pensadon pere de sia cerbo, kio estas same neebla, kiel neebla estas, ke vi povu sperti la ekziston de tiu ĉi malvarma, peza kestego, alimaniere ol per tuŝo kaj vido.

—Sed mi scias dank' al fiziko, ke mi konsistas el atomoj —mi ĵetis. Corcoran fortmove levis la manon.

—Ankaŭ li scias tion, Tichy. Li posedas sian laborato-

rion, kaj en ĝi ĉiujn aparatojn, kiujn povas liveri lia mondo... li per lorno rigardas stelojn, esploras iliajn movojn, kaj samtempe sentas la malvarman premon de okulvitroj sur la vizaĝo —ne, ne nun. Nun, laŭ sia kutimo, li promenas en sunlumo —ĉar en lia mondo, ĝuste estas sunleviĝo...

—Kaj kie estas la aliaj homoj, tiuj, inter kiuj li vivas? —mi demandis.

—Aliaj homoj? Kompreneble, ĉiuj ĉi estuloj, ĉiu el la kestegoj, troviĝas inter homoj... tiuj troviĝas —ĉiuj— en la cilindro. Mi vidas, ke vi ankoraŭ ne povas kompreni! Do eble konsciigos vin ekzemplo, kvankam malproksima. Jen vi troviĝas inter diversaj homoj en viaj songoj —iufoje inter tiuj, kiujn vi neniam vidis aŭ konis— kaj vi interparolis ofte en la songo, ĉu ne?

—Jes...

—Tiujn homojn kreas via cerbo. Sed songante, vi tion ne scias. Rimarku —tio estis nur ekzemplo. Ĉe ili estas alie —li etendis la manon— ili mem ne kreas siajn parencojn kaj fremdulojn— ĉi tiuj estas en la cilindro, tutaj homamasoj; kaj kiam, ni diru, mia sciencisto havas la subitan dezireton eliri sian ĝardenon kaj elparoli iun ajn preterpasanton, tiam —levante la kovrilon de la cilindro— vi rimarkus, kiel tio okazas: lia sensa ĉerpilo, pro impulso neperceptebla, trairos sur la alian bendon, ŝanĝante la ĝistiaman vojon, kaj komencos akcepti tion, kio troviĝas sur ĝi: Mi diras “ĉerpilo”, sed efektive ĝi estas centoj da mikroskopaj kurentaj kolektiloj, ĉar same kiel vi perceptas la mondon pere de vido, flaro, tuŝo, organo de ekvilibro —same ĝi ekkonas sian “mondon” pere de apartaj sensaj enirejoj, apartaj kanaloj, kaj nur lia elektra cerbo kunigas ĉiujn ĉi impresojn en ion unuecan. Sed tio estas nur detaloj teknikaj, Tichy, ne tro esencaj. Tuj post,

kiam la mekanismo estis unuafoje funkciigita, estu certa, ĉio estis nur afero de pacienco, nenio pli. Legu filozojn, Tichy, kaj vi ekvidos, kion ili diras, kiel ete ni povas fidi niajn sensajn impresojn, kiel ili estas trompaj, ne-certaj, erarigaj; sed ni posedas nenion krom ili. Same –li diris kun levita mano– okazas al ili. Sed kiel al ni, ankaŭ al ili tio ne malhelpas ami, avidi, malami, kaj ili povas tuŝi aliajn homojn, por ilin kisi aŭ mortigi... kaj ankaŭ tiuj miaj kreaĵoj, en sia eterna senmovo, dediĉas sin al pasioj kaj al furiozoj, ili perfidas sin, sopiras, revas...

–Ĉu vi pensas, ke tio ĉi estas nefekunda? –demandis mi subite, post kio Corcoran rigardis min pikokule, longan momenton, sen respondi.

–Jes –li diris fine– bone, ke mi enkondukis vin ĉi tien, Tichy... Ĉiu el la stultuloj, al kiuj mi montris tion, komencis sakri pri mia krueleco... Kiel vi komprenas viajn vortojn?

–Vi liveras al ili nur materialon –mi diris– en la formo de tiuj impulsoj. Same, kiel la mondo liveras ilin al ni. Kiam mi staras kaj rigardas stelojn, kion mi sentas dumtempe, kion mi pensas, tio estas nur proprieto mia, ne monda. Al ili –mi montris la vicojn da kestegoj– okazas same.

–Vi pravas –diris seke la profesoro. Li kliniĝis kaj pro tio ekŝajnis pli malgranda. Sed dirinte tion, vi permesis al mi eviti longan argumentadon, ĉar vi komprenas jam, kredeble, kial mi kreis ilin?

–Mi supozas. Sed mi volus aŭdi tion de vi mem.

–Bone. Iam, antaŭlonge, mi ekdubis pri la realeco de la mondo. Mi estis tiam ankoraŭ infano. La tiel nomata malico de la senviva objektoj, Tichy –kiu ne spertis ĝin? Ni ne povas trovi iun etaĵon, kvankam ni memoras, kie ni vidis ĝin lastfoje; fine ni retrovas ĝin aliloke, kun la

sento, ke ni kaptis la mondon ĉe la freŝa faro de iu neprecizeco, ielajneco... la plenkreskuloj diras, kompreneble, ke ni eraris, kaj la natura malfidemo de infano estas tiamaniere sufokita...Aŭ tio, kion oni nomas "le sentiment du deja vu": la impresio, ke situacion sendube novan travivatan unuafoje, ni jam spertis iam... Tutaj metafizikaj sistemoj, kiel la kredo je migrado de animoj, je reenkarnejo, formiĝis surbaze de tiuj fenomenoj. Kaj plu: la leĝo de la serioj, la ripetado de specife raraj fenomenoj, kiuj tiel ofte aperas pare, kaj kiujn la kuracistoj nomis en sia lingvo: duplicitas casuum. Kaj fine... spiritoj, pri kio mi demandis vin, legado de pensoj, levitacio kaj, kio estas plej neesplikebla kaj plej kolizias kun nia tuta scio, la kazoj, fakte raraj, de profetado de la futuro... la fenomeno, kiu estis priskribita en plej pasintaj tempoj, spite al ĉia ebleco, ĉar ĉiu scienca koncepto de la mondo ekskludas ĝin. Kaj kio estas tio ĉi —ĉio? Kion signifas? Ĉu vi diros aŭ ne?... Mankas al vi kuraĝo, Tichy... Rigardu...

Alirante la bretojn li montris la plej supran, apartan kestegon.

—Tie estas la stultulo de mia mondo —diris li kaj lia vizaĝo ŝanĝiĝis ĉe la rideto. Ĉu vi scias, kion li aliris en sia frenezo, kiu izolis lin de aliaj? Li dediĉis sin al la serĉado de la erarpovo de tiu mondo. Kaj konstato, Tichy, ke mi neniam diris, ke tiu lia mondo estas neerarpova kaj perfekta. La plej bone funkcia mekanismo povas de tempo al tempo panei: iu trablovo ekbalancas la kablojn kaj ili pli kunligiĝas dum momento, aŭ formiko eniras en la mezon de la cilindro... kaj ĉu vi scias, kion pensas tiam tiu frenezulo? Li asertas ke la telepation kaŭzas loka kurta cirkvito de dratoj apartenantaj al du diversaj kestegoj... ke ekvido de la futuro okazas, kiam la ĉerpilo, balan-

ciĝante, saltas subite de la ĝusta bendo al tiu, kiu disvolviĝos nur post multe da jaroj. Ke la impresoj, kvazaŭ li travivis jam tion, kio okazas al li vere unuafoje, estas kaŭzita de haltigo de la selektilo, kaj kiam tiu balanciĝas pendole puŝita de, mi ne scias... forkiko, tiam lia mondo spertas mirindajn kaj neklarigeblajn eventojn: En iu ekbrulas subita kaj malsaĝa sento, alia komencas aŭguri, la objektoj moviĝas mem aŭ intersanĝas lokojn... kaj antaŭ ĉio, kaŭze de tiuj ritmaj movoj okazas... la leĝo de la serioj! Grupigoj de raraj fenomenoj en vicojn... Lia frenezigo, satigante sin per tiuj publike neglektataj fenomenoj, kulminas en la aserto, pro kiu oni baldaŭ enŝlosos lin en frenezulejon... ke li mem estas fera kestego, kiel ĉiuj, kiuj ĉirkaŭas lin, ke la homoj estas nur aparatoj en angulo de malnova, polva laboratorio, kaj ke la mondo, ĝiaj ĉarmoj kaj hororoj, estas nur iluzioj. Li kuraĝis eĉ pripensi pri sia Dio, Tichy, Dio, kiu antaŭe, kiam li estis ankoraŭ naiva, faris miraklojn; sed poste, lia mondo edukis lin, ke tio, kion li nur povas fari, estas ne enmiksiĝi, ne ekzisti, ŝanĝi nenion en sia kreaĵo, ĉar nur al la nevakata dieco oni povas fidi... Vokita, montras sin stumpa kaj senforta... Kaj ĉu vi scias, kion pensas lia Dio, Tichy?

—Jes —mi respondis. Li pensas, ke li estas sama kiel tiu frenezulo. Sed sekve eblas ankaŭ tio, ke la proprietulo de la polva laboratorio, kie ni staras sur bretoj, ankaŭ estas mem kestego, konstruita de iu alia sciencisto de pli supra vico, posedanta originalajn kaj fantaziajn konceptojn... kaj tiel plu senfine. Ĉiu el tiuj eksperimentuloj estas Dio, estas kreanto de sia mondo, de tiuj kestegoj kaj ilia sorto, kaj li havas sub si siajn Adamojn kaj Evojn, kaj super si, sian superulon en la hierarkio, pli supran Dion. Kaj por tio vi faris ĉion ĉi, profesoro...

—Jes —respondis Corcoran. Kaj ĉar mi akceptas tion,

vi scias verdire tiom, kiom mi, kaj plua interparolado estus sencela. Dankon, ĉar vi volis veni, kaj adiaŭ.

Jen kiel, amikoj, finiĝis tiu eksterordinara konateco. Mi ne scias, ĉu la kestegoj de Corcoran ankoraŭ funkcias. Povas esti, ke jes; kaj ili songas sian vivon kun ĝiaj briloj kaj timegoj, kiuj estas nur svarmo da impulsoj aglutinitaj en filmbendoj, kaj Corcoran, fininte labortagon, ascendas ĉiuvespere feran ŝtuparon, malfermante ĉiujn ŝtalajn pordojn per tiu granda ŝlosilo, kiun li portas en poŝo de mantelaĉo bruldifektita de acidoj... kaj li haltas tie, en polva mallumo, por aŭskultadi la etan susuron de kurentoj kaj la sonon, apenaŭ aŭdeblan, kun kiu turnas sin pigre la cilindro... traŝoviĝas la bendoj... kaj estiĝas la sorto. Kaj mi pensas, ke li sentas tiam, spite al siaj vortoj, la volon enmiksiĝi, eniri kun impona ĉiopovo en la fundon de la mondo, kiun li kreis, kaj savi el ĝi iun kiu predikas Redempton, mi kredas ke li hezitas, sola ĉe la malpura lumo de nudaj ampoloj, ĉu savi iun vivon, iun amon; kaj mi estas certa, ke li faros tion neniam. Li rezistos tentadojn, ĉar li volas esti Dio, kaj la nura dieco, kiun ni konas, estas la silenta aprobo de ĉiu homa ago, ĉiu krimo, kaj ne ekzistas por li pli granda rekompenco ol la ribelo de la feraj kestegoj ripetata de generacio al generacio, kiam ili firmiĝas, prudentoplenaj, en la pensoj, ke li ne ekzistas. Tiam li ridetas silente kaj foriras, fermante post si la vicojn da pordoj, kaj en la malpleno aŭdiĝas, kvazaŭ la voĉo de agonianta muŝo, nur eta zumo de kurentoj.

Tradukis Zbigniew Sienkiewicz

© Kopirajto 1971 ĉe Stanislaw Lem